

Gejsero

Gejsero (el la islanda *geysa* - turniĝadi, flui), estas varmega fonto, kiu elŝprucas akvon regule aŭ neregule kiel fontano. Similan elŝprucon oni nomas erupcio ĉe vulkano.

Gejsero estas la plej impona kaj fama el la islandaj akvofontoj. El ĝia nomo aliaj samtipaj ŝprucigaj fontoj gajnis siajn nomojn. Antaŭe ĝi erupcias ordinare ĉiutage sed nun oni devas instigi ĝin per sapo aŭ similaj materioj.

La varmo de ĝia akvo sur la supraĵo estas 76-86 °C. Sed pli profunde en la fonto ĝi estas 120-130 °C.

La erupcioj komenciĝas je potencaj, basaj muĝoj en la profundo de la fonto. Samtempe la surfaco de la akvo komencas pli forte boli, kaj iom post iom ĝi leviĝas pli kaj pli, ĝis el la giganta fontotruo saltegas 50 ĝis 70 metre alta akvokolono, kiu per furioza forto kaj skuanta bruego ĵetas siblantajn akvotorentojn super la tutan ĉirkaŭaĵon, ĝis la erupcio malrapide ĉesas kaj silentiĝas post 15 ĝis 30 minuta spektaklo.

Retpaĝo: www.traduki.de

Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Gejsero